# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).

Kotizoj (kun bulteno)

| | | |
|---|---|---|
| a) | Junuloj | : 2 Fr. |
| b) | Aktiva membreco | : 3 Fr. |
| c) | Subtenanto | : 5 Fr. |

Fédération Espérantiste du Nord de la France,
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (P.-de-C.).
C.C.P. LILLE 517-15.

---

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (P.-de-C.).

---

Informilo n-ro 3 Majo-Junio 1964

## NI FUNEBRAS.

Forpasis la Madagaskara Eks-Ministro S-ro Gervais RANDRIANASOLO, honora prezidanto de la Madagaskara E-Asocio.

Lia morto estas grava perdo por niaj madagaskaraj samideanoj k la tuta esperantistaro.

## KULTURDOMO DE LA FRANCAJ ESPERANTISTOJ

### SOMERO 1964

1-a periodo - 2 - 19 Julio : Internaciaj kaj Turismaj Ferioj.
2-a periodo - 19 Julio - 9 Aŭgusto : Preparo por 3 Ekzamenoj.
3-a periodo - 9 - 30 Aŭgusto : Niaj esperantistaj k kulturaj semajnoj.
4-a periodo - 30 Aŭgusto - 13 Septembro : Studrestado organizita de U.E.F.

La detalan programon havigas kontraŭ reafranko :
- Maison Culturelle Espérantiste, Château de Grésillon,
BAUGE (Maine-et-Loire).

# RAPORTO PRI LA 3-a MARKOLA KONGRESO
# EN CALAIS (PASKON 1964)

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Post Bulonjo ĉe Maro (1962) kaj Dovro (1963) Kalezo "ŝlosilo de Francujo" akceptis ĉijare la Kongresanojn de la Markola Konfederacio, dum la 3 paskaj tagoj.

Pli ol 70 gesamideanoj el Britujo, Belgujo, Nederlando kaj Norda Francujo plezure retrovis la kutiman simpatian etoson de la konfederaciaj renkontiĝoj.

Ekde la 15-a horo Sabate alvenis la unuaj kongresanoj ĉe la Akceptejo (Oficejo apud la Stacidomo afable metita sub nia dispono de la Turismoficejo). Niaj anglaj amikoj estis akceptitaj en la Mara Stacidomo.

La tuta posttagmezo - libera - ebligis al ĉiuj ĉu retrovi konatojn de la antaŭaj kongresoj, ĉu renkonti novajn amikojn kaj viziti la urbon kaj havenon.

La Kongreso oficiale malfermiĝis dimanĉe, kun rendevuo antaŭ la Urbodomo je la 12-a kaj duono por la tradicia foto. Nia angla amiko HARTRIDGE, akompanata de 9 gejunuloj, venis kun aŭtobuseto, sur kiu oni povis vidi multajn sloganojn favorajn al Esperanto en pluraj lingvoj. Ĝi rikoltis grandan sukceson ĉe la gazetistoj kaj ankaŭ la ekstera publiko.

Je la 13-a, Bankedo arigis ĉiujn en "Salle Centrale". La partoprenantoj trovis ĉe sia loko esperante redaktitan menuon. Kutima gaja etoso dum la manĝado. Je la deserto, S-ro BUERICK, prezidanto de la Kaleza Kultura Centro ESPERANTO salutis kaj dankis la ĉeestantojn. Li poste donis la parolvicon al S-ro PHILIPPE, Honorprezidanto de Nordfranca Esperanto-Federacio, kiu prezidis tiun bankedon. S-ro PHILIPPE rememorigis, ke en Calais estis preparita en 1904 la unua Universala Kongreso, kiu okazis en Bulonjo ĉe Maro en 1905. Li esprimis la deziron, ke ĉiu urbo honoru la memoron de ZAMENHOF, donante sian nomon al iu strato.

La urbaj instancoj, invititaj, senkulpiĝis, detenataj pro aliaj okupaĵoj.

La posttagmezo estis dediĉita al ekskurso, tra la regiono, pagita de la Kaleza Turismoficejo. Aŭtobuso kondukis nin al Ardres, Guines, Marquise, Ambleteuse, Cap Gris-Nez, Wissant, Sangatte. Survoje, ni vizitis, apud Ardres, la Vizonbredejon de niaj danaj gesamideanoj Ges-roj SKOLE, kiuj regalis ĉiujn per teo k kukoj. Bedaŭrinde, malvarma k venta vetero ne kontribuis la sukceson de tiu promenado.

Vespere, je la 20-a k. duono, ni retroviĝis ĉe "Salle Centrale", en la festosalono, kie okazis distra programo. Dum disvolviĝis la programo, la kongresanoj manĝis sandviĉojn kaj trinkis, en familia etoso, sur tabletoj aranĝitaj, kiel en kabareto.

Ni admiris belegan projekcion de kolorriĉaj diapozitivoj prezentitaj de la kaleza Foto-Klubo kun esperantaj komentoj. Du skeĉoj luditaj de S-roj BEN WEBER, DOYELLE kaj LENEL multe amuzis la ĉeestantaron, kiu tre aplaŭdis ilin. S-ro DUCROCQ deklamis poemon "La korvo kaj la vulpo"; kaj nia nederlanda samideano BEN WEBER, kun sia kutima vervo, ĝojigis nin per amuzaj anekdotoj.

Dank' al nia juna pianludanto, Bennie WEBER, muzikaj intermezoj ligis la diversajn programerojn.

Lunde matene, je la 10-a : laborkunsido ĉe la Urbodomo. Prezidis S-ro CURNELLE, anstataŭante S-ron ODENT, Prezidanton de la Nordfranca Esperanto-Federacio, detenitan.

La ĉefa punkto de la diskutoj estis la elekto de la loko por la 4-a Markola Kongreso. Ĉu en Belgujo? Verŝajne jes, sed foreste de belgaj oficialaj reprezentantoj, postaj kontaktoj estos necesaj por elekti la urbon. (eble OSTENDO aŭ BRUĜO).

Posttagmeze, la Kongresanoj denove retroviĝis ĉe la Akceptejo por lasta adiaŭa rendevuo antaŭ ol forlasi la kongresurbon ĉu per ŝipo, ĉu per fervojo aŭ aŭtomobilo.

La 3-a Markola Kongreso forvivis! Vivu la 4-a! KIE?

Redaktis : Fernand DITACROUTE,
LKK - Sekretario,
Vic-reprezentanto de NFEF por M.K.

P.S. - Por konkludi, la LKK petas senkulpigon pri la ne ĉiam perfekta organizado de la diversaj manifestacioj. Pro manko de sperto ĉi-foje, ĝi esperas, ke la proksima Kongreso organizota en Kalezo.... post kelkaj jaroj!.... pli bone kontentigos la partoprenontojn. Multan dankon al ĉiuj kaj rendevuon en 1965!

---

N.D.L.R. La Nordfranca E-Federacio gratulas kaj dankas la kalezajn L.K.K.-anojn por la tre plaĉa aranĝo. Ĝi esperas, ke estontece la lokaj oficialuloj montros pli da intereso pri nia internacia movado.

---

DU GRAVAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ :

I - 8 Aŭgusto 1964 : 49-a Universala Kongreso de Esperanto en HAGO (DEN HAG) Nederlando.

8 - 15 Aŭgusto 1964 : 20-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso de TEJO en Amsterdamo (Anne FRANK-Domo).

Por pliaj sciigoj, oni skribu, kunsendante internacian respondkuponon, al :

U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (Nederlando)

aŭ oni sin turnu, kun reafranko al :

U.F.E., 34, rue de Chabrol, PARIS (X°).

## NIA VIVO

Caudry (Nord)

Iniciate de la loka grupo, grava informkunveno okazis merkrede 15-an de Aprilo en la akceptejo de la urba festsalono, sub prezido de la distrikta lernejinspektoro S-ro J. THOME.

La preleganto, S-ro WILHELM, Profesoro ĉe "Artoj kaj Metioj" en Lille, klare prezentis la problemojn starigitajn por la elekto de internacia lingvo.

"Se ĉiuj homoj konsentas konfesi ĝian utilecon, tamen, fakte, ĉiuj antaŭaj provoj (Volapuko, readaptita latino, internaciigita nacia lingvo, ktp.) fiaskis."

- Nu, ĉu Esperanto?

Konstruita ekde radikoj komunaj al la diversaj lingvoj, helpe de serio da prefiksoj kaj sufiksoj kaj bazita sur gramatiko sen esceptoj, Esperanto, laŭ S-ro WILHELM, prezentiĝas kiel la tute taŭga internacia lingvo.

Resume, la preleganto pruvis la utilecon de tiu lingvo kaj demonstris, ke ĝi kapablas esprimi la subtilaĵojn kaj rafinaĵojn de SHAKESPEARE, GOETHE, PROUST, ktp.

Honoris tiun vesperon per ĉeesto : S-roj Arthur EGO, Prezidanto de la loka Esperantista Grupo, Claude BODSON, Vicprezidanto, Marcel LIGOT, Profesoro, Prezidanto de la Esperantista Grupo en Valenciennes.

Survoje al Mediteranea krozado, 12 junaj britaj esperantistoj trapasis vagonare nian regionon, la 23-an de marto. La tiurilataj informoj de S-ro Norman WILLIAMS ebligis la aperigon de ampleksa artikolo ĉe la junulara rubriko de "Nord-Eclair" (30/3/64).

Vizito de ĉekaj esperantistoj :

Jam konata de kelkaj federacianoj, kiuj renkontis lin lastjare, S-ro Drahomir KOĈVARA (adreso : OSTRAVA-ZABREH, Dolni 2287, Ĉekoslovakio) intencas gasti kun sia edzino ĉe parencoj, Ges-roj BORKOWSKI, 67, rue Robespierre, MERICOURT-sous-LENS (P.-de-C.) de la 15-a de Julio ĝis la 15-a de Aŭgusto.

Interesatoj skribu al li por eventuala akcepto, aŭ turnu sin al :

- Lucien GILOTEAUX, 7, rue Saint-Saëns, WATTRELOS (Nord).

Radio :

La franclingvaj servoj de Brita Radio jam respondis al 10 demandoj de la federacia informa fako.

La franclingva programo de Brita Radio estas disaŭdigata ĉiulunde, je la 20-a, laŭ la meza ondolongo je 232 metroj.

Hazebrouck :

Niaj lokaj delegitoj, Ges-roj LENEL decidis inviti la konatan Cseh-instruanton S-ro SIPKE STUIT, por prezenti rektmetodan provlecionon en Hazebrouck, ĉe la gea liceo, merkrede, 27-an de Majo. Bona iniciato, kiu espereble montriĝos fruktodona.

# PROTOKOLO PRI NIA FEDERACIA KONGRESO EN LILLE LA 3-an DE MAJO 1964

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

En Salono C ĉe la Komerca Foiro, ĉeestis 53 ges-anoj.

Ne tiel kontentiga partopreno, kiel kutime, S-ro BOUQUIN, Prezidanto de LILLE-ESPERANTO, malfermante la kunsidon per bonvenvortoj, trafe akcentis, "ke la kulpo estas la fakto de la nuna vivo : la homoj estas multe k. multe okupataj pri diversaj aferoj. Ni devas klopodi por ke oni enkonduku Esperanton en lernejojn, por ke la junuloj restu Esperantistoj dum la tuta vivo. Varbi plenkreskulojn estas nuntempe tute hazarda afero".

S-ro Lucien BOURGOIS senkulpigis S-ron ODENT, Federacian Prezidanton, fortenitan pro familia ceremonio kaj anstataŭis lin, kiel kunsidprezidanton.

Post legado de la tagordo, li transdonis la parolvicon al la Ĝenerala Sekretario. S-ro Fernand DITACROUTE prezentis la agadraporton de nia Federacio dum la Jaro 1963, kiun vi povos legi en la proksima bulteno.

S-ro DOYELLE, Kasisto, diris kelkajn vortojn, klarigante, ke nia kaso estas en bona stato. Ni havas nuntempe pli ol 500 Fr. en la kaso, kaj estas ankoraŭ multaj enkasigotaj kotizoj kaj sperable subvencioj.

Unuvoĉe, la nuna Estraro de la Fed. estis reelektita.

Kiel kutime, la Prezidanto invitis la grupestrojn preni la parolvicon por doni novaĵojn pri la grupoj. Parolis S-roj LIGOT (Valenciennes), GILOTEAUX (Tourcoing), BOURGOIS (Hénin-Liétard), BONVOISIN (Calais), BODSON (Caudry), MONNIER (Arras) kaj F-ino MAUCHIEN (Amiens).

Laŭ propono de S-ro LENEL, la proksima federacia renkontiĝo verŝajne okazos en HAZEBROUCK en Oktobro.

S-ro GILOTEAUX poste priparolis la gazetaran servon :

- li konsilis al la lokaj grupoj anonci per la gazetaro ĉiujn okazontajn manifestaciojn kaj poste raporti pri ili.

- la esperantista gazetaro pli k. pli anoncas niajn fed. aranĝojn des pli, ke multaj eksterlandanoj nun partoprenas ilin. .

- la konata adresaro RAVET-ANCEAU aperigas informojn pri la E-grupoj, kiuj anoncis sin, kaj estas preta fari pli, t.e. : aperigi sub rubriko ESPERANTO la nomojn de izolitaj esperantistoj, kie ne ekzistas grupoj.

- U.E.A. eldonis komercan adresaron , en kiu ĉiu esperantisto, kiu rilatas kun komercisto, industriisto, ktp., povas enskribiĝi.

- Por tiuj, kiuj deziras informiĝi pri Azio, 2 interesaj esperantaj revuoj, kies abonprezo estas malmultekosta : OOMOTO (Japanujo) kaj EL POPOLA ĈINIO.

- S-ro GILOTEAUX poste sciigis, ke la komitato de UFE esprimis la deziron, ke la proksima Nacia Kongreso okazu, se eblas, en Norda Francujo. Niaj amikoj el CAUDRY organizos ĝin kaj promesis baldaŭan decidon.

Li ankaŭ anoncis la viziton de ĉekoslovaka esperantisto S-ro KOĈVARA, en Norda Francujo, de la 15-a de Julio ĝis la 15-a de Aŭgusto. Li volonte vizitos federacianojn kaj partoprenos liberajn debatojn.

(Ĉiuj interesatoj pri unu aŭ alia el la ĉi-supraj punktoj, bv. skribi al S-ro GILOTEAUX, 7, rue Saint-Saëns - WATTRELOS (Nord).

Fine, S-ro GILOTEAUX sciigis, ke S-ro ODENT rezignis sian postenon, kiel komitatano de UFE. Necesas do, ke Norda Federacio prezentu alian kandidaton. Interesatoj bv. anonci sin.

Antaŭ la fermo de la kunsido, kiel kutime, la parolvico estis donita al niaj eksterlandaj vizitantoj.

Je la 13-a, honorvino estis la okazo por S-ino RACHEL LEMPEREUR, deputitino, esprimi per afablaj vortoj, sian simpation al nia agado favore al la Paco kaj reciproka interkompreniĝo. Respondis S-ano BOUQUIN per elokventa paroladeto. Ni ankaŭ rimarkis la ĉeeston de S-ro ZIMMERMANN, administra Sekretario de la Foiro.

Tre gaja atmosfero kiel kutime dum la Bankedo. S-ro PICAVET, foira reprezentanto, nia ĉiama gasto, eldiris sian ĝojon retroviĝi inter ni.

Per ekzamenoj finiĝis tiu Lille-a Tago. Ni petas ĉiujn organizintojn akcepti varman dankon.

RENDEVUO DUM AŬTUNO, EN HAZEBROUCK?

Redaktis : Fernand DITACROUTE.

Lasthore :

GRAVA SCIIGO :

FONDO DE JUNULARA FAKO!

Ĝis nun, nia federacio ne posedis junularan fakon.
Tio estis grava manko, ĉar ĉiu devas trovi eblecon praktiki la lingvon laŭ sia intereskampo.

La junaj novbakitaj esperantistoj devas nepre organiziĝi, ekskursi, propagandi en sia propra medio.
La Nordfranca E-Federacio volonte helpos, konsilos k gvidos ilin en iliaj unuaj paŝoj. Nia bulteno volonte kontribuos per "junulara angulo".
17-jara seminariano decidis gvidi nian junularan fakon. Li serĉas eventualajn kunlaborantojn.
Grupestroj estas petataj enskribigi siajn junajn membrojn k interrilatigi ilin kun :

- S-ro BAILLEUL Jean, 35, rue de Muret, ROUVROY (P.-de-C.).

Kompreneble, izolaj junuloj ankaŭ estos bonvenaj.

Al sia legantaro, "Norda Gazeto" deziras agrablajn somerferiojn!

Le gérant resp. Lucien BOURGOIS, 21, rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).